

DATREVENO DE D-RO ZAMENHOF

La 14an de aprilo pasis la centa datreveno de la morto de Dro. Zamenhof, kaj diversaj amaskomunikiloj, ankaŭ en Madrido, memoris tiun okazaĵon.

La ĵurnalo “El Mundo” pretigis raporton en nia sidejo, kaj intervjuis plurajn personojn cele al raporto. Ĝi aperis la 14an de aprilo mem, tutpaĝe kaj kun malgranda alvoko en la ĉefpaĝo de la ĵurnalo. La artikolo aperis ankaŭ en la reto, kun titolo: “*Esperanto: utopía, orgullo y éxito*” (Esperanto: utopio, fiereco kaj sukceso), kaj kun video en kiu aperas konversacio inter kvin madridaj esperantistoj.



Aparte, la lundon, 24-an de aprilo, MEL organizis debaton en sia sidejo, pri la temo: “Kiu estas la aktualeco de la pensado de D-ro Zamenhof?”. Ĝi estis enkondukita de Toño del Barrio, kaj partoprenis ĉ. 15 homoj, kiuj diskutis la ideojn de Dro. Esperanto kaj ilian gravecon por la nuna mondo.

PUBLIKA ĈEESTO DE ESPERANTO EN APRILO

La vendredon, la 21an de aprilo, je la 7a ptm, tri E-poetoj, Ana Manero, Jorge Camacho kaj Miguel Fernández, grupe kun hispanlingva kolego Alberto García-Teresa, prezentis dulingve (hispane-esperante) poezian vesperon en la madrida memmastrumata kulturcentro EKO (strato Ánade, n-ro 10), kadre de la liberecanaj kulturaj renkontiĝoj JACA3.

La sekvan tagon, kiel jam tradicie, okazis la publika legado de Donkiĥoto en kultur-institucio Círculo de Bellas Artes, dum tri tagoj ĉirkaŭ la Tago de la Libro. Ĉijare denove du esperantistoj kontribuis per legado en Esperanto: Darío Mora kaj Alejandro Pareja. Ilia partopreno estas spektebla en la kanalo de Youtube de MEL.



Ankaŭ okaze de la celebrado en aprilo de la Tago de la Libro, Esperanto rolis en alia evento en Madrido: la prezidanto de HEF estis invitita al ceremonio en la Kongreso de Deputitoj de Hispanio, dum kiu oni organizis prezentadon de ekzempleroj de tradukoj de Don Quijote, donacitaj al ties Biblioteko fare de eksterlandaj ambasadoj, kaj ankaŭ de la traduko al Esperanto, donacita de HEF. La ceremonio okazis la 20an de aprilo en la *salono de perditaj paŝoj* de la Parlamentejo, kun paroladoj de la prezidanto de la hispana Parlamento, Ana

Pastor, la prezidanto de ties komisiono pri kulturo, kaj la direktoro de la Reĝa Akademio de la Hispana Lingvo.

Oni povas spekti la tutan eventon en filmo en la retejo de la Parlamento: <https://www.youtube.com/watch?v=QTMTOF-cIJw>. En minuto 10,20 de la filmo, la prezidanto de la Kongreso de Deputitoj dankas al HEF pro la donaco de la ekzemplero.

KUNVENOJ EN MAJO

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30 (atentu tamen ke ĉimonate kelkaj lokaj festoj okazos lunde, kaj do ne certas la malfermo de la sidejo).

Oni ripetos ankaŭ la unuasabatajn renkontiĝojn la venontan 6-an de majo je la 6-a vespere en la sama loko kiel pasintmonate, kafejo Café Madrid, en la strato Mesón de Paños, 6 (centra strato, kiu iras el Ópera al la placo Mayor). Venu, ĉar ĉifoje oni profitos la okazon por filmi mallongan scenon, por projekto pri kiu ni rakontos poste.

Konsiderante la sukceson en la alvoko de la debato programita en aprilo, oni decidis kunvoki alian debaton por la lasta lundo de majo. La temo estos: “Ĉu plu validas la koncepto Fina Venko, kaj kiu strategio taŭgas por ĝi?”. Notu: la 29-an de majo, ekde la 19,00.

REZERVU DATOJN EN JUNIO

Memoru krome ke por la lasta semajno de junio estas programita la okazigo de la Hispana Kongreso en Teruelo. La organizantoj ampleksigis la duan aliĝperiodon ĝis la 15-a de majo. Konsultu en la adreso <http://esperanto.es/kongreso/> la programon kaj aliajn informojn. En la sidejo troviĝas aliĝiloj, kaj vi povas enskribiĝi ankaŭ rete ĉe: <http://esperanto.es/kongresaligo>.

Dum tiu lasta semajno de junio oni antaŭvidas aliajn diversajn eventojn, ankaŭ en Madrido, ligitajn al la certa ĉeesto de pluraj vizitantoj survoje al la kongreso, kaj al aliaj prezentadoj, kiujn ni ankoraŭ ne deziras malkaŝi, ĝis ĉiuj detaloj konkretiĝos. Tamen, rezervu jam vian disponeblecon por tiuj datoj.

Memoru ankaŭ ke oni programis ekzamenojn de Esperanto por tiu monato, konkrete la 10-an de junio en Zaragozo. Kontakti kun kurso@esperanto.es por koni detalojn kaj eventuale aliĝi.

VOJAĜOJ

La 26-an de aprilo, okaze de labor-vojaĝo al Malago, la prezidanto de MEL renkontiĝis kun kelkaj tieaj esperantoparolantoj, kune tagmanĝis, kafumis kaj interŝanĝis spertojn kaj opiniojn.

Brazila samideano Márcio Alexandre trairis Madridon ene de sia bicikla vojaĝo tra la mondo.

KONTAKTOJ

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com